



Okulfrapaj ŝanĝoj en Japanio

Mikrokreditoj: ĉu helpo aŭ trompo?

**Referendumo
en Svislando
kontraŭ minaretoj**



Ĉu vi jam legis?



Plej furoris en 2008

1. Ziko van Dijk: La Asocio
2. Wendy Heller: Lidia
3. Stephan Lang: La talpočasisto
4. La Jaro 2009
5. Anna Löwenstein: La ŝtona urbo
6. Edwin de Kock: Sub fremdaj ĉielo
7. Katalin Kovacs: Poŝamiko
8. Petro De Smedt: Zakwoordenboekje/
Poŝvortareto Esperanto-Nederlands-Esperanto
9. Lena Karpunina: Neokazinta amo
10. Ziko van Dijk: Informado praktike
11. Stefan MacGill: Nemave edifi
12. Ludoviko Zamenhof: Fundamento
de Esperanto (hungara)
13. Alberto Fernandez: Kalejdoskopla rememoro
14. Carlo Collodi: La aventuroj de Pinokjo
15. Wandel/Galadi: La kosmo kaj ni (2a eldono)
16. Sen Rodin: Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj
rakontoj
17. Ilustrita oficiala radikaro
18. Petro De Smedt: Nederlands Esperanto
Nederlands
19. Marcus Sikosek: Esperanto sen mitoj
20. Hergé: Tinĉjo en Tibeto
21. Anna Löwenstein: Morto de artisto
22. Hergé: La Nigra insulo
23. Sagao de Njal
24. Sten Johansson: Krimo de Katrina
25. Andrzej Pettyn: Humuro laŭ la skota
maniero

La jenaj 25 verkoj en la Butiko de Flandra Esperanto-Ligo plej furoris en 2008.

Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en www.retbuto.net, sed vi povas kompreneble skribi ankaŭ per la „klasika poŝto” al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Demokratio kontraŭ minaretoj 8

Antaŭ la fino de la jaro svisaj civitanoj estos decidintaj pri eventuala aldono de unusola frazo al la konstitucio: „Estas malpermesite konstrui minaretojn.” Larĝaj rajtoj estas granda riĉeco en demokratio, sed ili povas esti misuzataj de provokistoj dezirantaj starigi homon kontraŭ homo.



Ŝanĝoj okulfrapaj

Post la venko de la Demokratia Partio (DP) en la ĝenerala elekto, Hatojama Jukio estis elektita meze de septembro la 93a ĉefministro de Japanio. La nova ministraro konsentis pri du bazaj principoj: „realigo de vera popola suvereneco” kaj „realigo de enhavoriĉa regiona suvereneco”. Kunligitaj estas tri sloganoj: „memstara kaj kunvivado”, „rekreo de sociaj ligiloj” kaj „frateca socio”.



Enigmoj de Sanxingdui 14

En Sanxingdui arkeologoj trovis ruinojn de antikva urbo kun areo de 12 kvadrataj kilometroj kaj elfosis grandan kvanton da bronzaĵoj, jadeoj kaj oraj objektoj. La loka registaro konstruigis grandiozan muzeon tie kaj petas listigi la ruinojn kiel Mondan Heredaĵon.



Mikrokreditoj:

ĉu helpo aŭ trompo?

En la jaro 2006 la Nobel-premio pri paco estis transdonita al la bangladeŝa ekonomikisto Muhammad Yunus kaj la Grameen Bank iniciatita de li. Tio estis rekono de mikrokreditoj, sistemo de etskala kreditado al malriĉaj personoj, kiuj ne kapablas pruntepreni monon de banko. La bangladeŝa ekzemplo estis imitata en multaj landoj, sed kritikantoj plioftiĝas.



FOTO DE LA KOVILCO: ROB POTVIN

politiko

Svislando	8
Demokratio kontraŭ minaretoj	
Japanio	10
Ŝanĝoj okulfrapaj	
Hatojama Jukio: Nova ĉefministro	
Aŭstrio	11
Enlanda eksterlanda politiko	
Litovio	12
Ofendas „humuro”	
Albanio	12
Ridinda aserto	
Niĝerio	13
Ĉu amnestio kondukos al paco?	

arto

Ĉinio	14
Enigmoj de Sanxingdui	

moderna vivo

Nepalo	16
Fina venko	
Familioj	17
Al genepoj nepras geavoj	
Aviado	18
Fluge al agnosko	

ekonomio

Financoj	19
Mikrokreditoj: ĉu helpo aŭ trompo?	
Belgio	20
Eksporto el Valonio kreskas pli rapide ol el Flandrio	
Litovio	21
Litovio fermiĝas	
Pollando	22
Kvin jarojn en Eŭropa Unio	

spirita vivo

Arkta mito	23
Praa religia temo	

libroj

Vojaĝromano klasika	25
Edikto el oriento?	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia ridpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	35	38	21	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	65
Estonio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (or.)	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Grekio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hispanio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hungario	HUF	7400	8200	4440	1500	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	35	38	21	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Latvio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Litovio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	35	38	21	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovakio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovenio	EUR	35	38	21	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5,5	9

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Point Tas 7004, Australia.
Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140,
2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio
de Britio, Esperanto House, Station Road,
Barlston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE,
Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnicky@quick.cz.
- **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eaficejo@esperanto.fi.
- **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
► Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering,
(Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
► Hans Dietrich Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
► Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de
Pensions 2100-0461-90-0200055053).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
Bakatsu. 1/3 III. l. Reto: abonasoftware@gmail.com.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Latvia:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
0089 3612 0000).
Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date
Crescent, Christchurch 8025.
Reto: gdewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- **Ruslandaj:**
► Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
► Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
- **Slovenaj kaj Slovakaj:**
► Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
► Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: beckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
► Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
► Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Aliaj tempoj, samaj temoj



Finiĝas la 30a jaro de nia magazino. Kiel mi skribis ĉi-loke antaŭ unu jaro, ni ne intencis pompe festi tiun jubileon. Tamen estas, eĉ se modesta, sukceso por ni atingi ĝin. Kaj ni povas konstati, ke ankaŭ tiu ĉi jaro estis interesa laŭ multaj aspektoj. Karakterizis ĝin gravaj temoj, ekzemple militoj en Afganio kaj Irako, krizoj de energio kaj financoj, Irano, klimato kaj nova usona prezidanto. Okaze de la jubileo mi foliumis la unuan jarkolekton, tiun de 1980, kaj iom miris: en ĝi ni traktis grandparte samajn temojn, kiel 30 jarojn poste.

Ni havis artikol-serion pri Afganio, kiun tiam provis konkeri la sovetia armeo. Kiel konate, Sovetio fiaskis kaj devis retiri siajn trupojn – ĉu same devos fari la nuna alianco sub gvido de Usono, kiu invadis la landon? Ankaŭ pri Irano ni raportis plurfoje, post la sukceso de la islama revolucio. Okcidentaj registaroj timis, ke ties ideoj disvastiĝos al aliaj islamaj landoj. Ankaŭ hodiaŭ ili timas Iranon, nun pro la eblo, ke la lando ekhavas atombombon. Kiel najbara Pakistano, kiu ankaŭ en 1980 estis temo pro diversaj perturboj. Diference tamen Irako tiam ne estis en la fokuso de intereso, kiel nun.

Inter la ĝeneralaj temoj tiam estis precipe energi-krizo. Ni donis konsilojn al la legantoj, kiel ŝpari benzinon, kaj ni prezentis novajn, alternativajn energifontojn: sunkolektilojn kaj ventoturbinojn, eĉ jam eblon gajni energion per

biogaso. Tio, kion tiam ankoraŭ neniu sciis, estis, ke la klimato tiom draste ŝanĝiĝos, kiel ni spertas nun. Ankaŭ en 1980 ni havis ekonomian krizon, kiu ekzemple forte trafis Brition, kiun ekregis Margaret Thatcher. La dekstrega sinjorino venkis, ĉar elektantoj pli multe fidis al ŝi pri ekonomio, ol al la laborista partio. Ŝi resanigis la ekonomion per rigoraj metodoj. Se nun estus elektoj en Britio, same malvenkus la laborista partio. Ĉu do la historio ripetiĝas?

En Usono en 1980 elektiĝis nova prezidanto, Ronald Reagan. Li ne ricevis la pacpremion de Nobel, kvankam dum sia dua oficperiodo li multon faris por mildigi la tiaman malvarman militon inter Sovetio kaj Usono. Ankaŭ ĉi-jare en Usono ekegis nova prezidanto, kiu tuj ricevis la Nobel-premion, ne pro meritoj, sed nur pro mitoj, ne pro faroj, sed pro vortoj, kiel diras kritikantoj. Ni esperu, ke la faroj sekvos dum la venonta jaro. Ĉion bonan por 2010 al vi ĉiuj!

Sincere via

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Ferriol Macip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseo:** Sendu al la koncerna redakto-ro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Viena, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librecozonojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Viena, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Flandra Esperanto-Ligo

invitas vin al la

BENELUKSA KONGRESO

13-16 majo 2010

Antverpeno, Belgio

“Lingva prismo en Benelukso”

El la programo:

- la lingva prismo en Benelukso: prelegoj i.a. de Istvan Ertl, Alain Dawson, ...
- prelego pri 50 jaroj Benelukso
- popola balo kun esperanta grupo **Kapriol'**!
- ekskursoj al malpli turismaj lokoj
- jubileo de Movado sen Nomo

Restado:

Ni trovis neluksan sed puran gastejon sufiĉe proksiman al la esperantocentro! Se vi rapide aliĝas, vi havos liton por nur 13€ nokte. Alia, pli luksa hotelo (35€nokte) disponeblas ankaŭ!

Por pliaj informoj:

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
2000 Antwerpen

+32(0)3.234.34.00
sekretario@fel.esperanto.be

<http://www.esperanto.be/kongreso>

Du mil naŭ

de Stefan MAUL

La plej inteligentan proponon ĉi-jare faris sendube la libia revoluciestro Muĥamar Gadafi. La eksterorista beduono postulis disbati Svislandon, ĉar tie post pu(g)na interbatado lia filo estis arestita. Laŭ li la germana parto de Svislando transiĝu al Germanio, la franca al Francio kaj la itala al Italio. Klare, ke Italio kaj Francio estas favorataj de Gadafi, ĉar kaj la franca prezidanto Nikolas Sarkozy kaj la itala grandsinjoro Silvio Berlusconi estas liaj sentimaj intimaj amikoj. Tamen ĝis nun oni ne povis observi, ke la germana kanceliero Angela Merkel estus amikino de la libiano. Aliflanke Svislando rilatas relative malamike al Germanio, ĉar la germana financ-ministro per drastaj vortoj draŝis Svislandon (kaj Liĥtenŝtejnon), ĉar ili ebligis al eksterlandaj (do ankaŭ germanaj) impostri-fuzantoj deponi sian nigran monon en ties bonkoraj bankoj kaj pagi nenian tributon al iu ajn ŝtato.

Malriĉa milionulo

Svisoj kaj Liĥtenŝtejnanoj estis ofenditaj, tamen ŝanĝis siajn bankpreskribojn, tiel ke eŭropaj financdizertintoj nun devas serĉi (kaj facile trovas) aliajn impost-oazonjn ie ajn en Oceanio – la sola malavantaĝo estas, ke ili nun devas longe flugi por vidi sian monomonton. Sed eble ili ja perdis, pro la finankkrizo, monon. Tiel okazis al la ĉefo de la plej granda germana privatbanko DB. En la jaro 2007 li ricevis salajron de 13,9 milionoj da eŭroj, dum 2008 nur (!) 1,4 milionojn; la enspezoj de la kompatinda bankisto do falegis je 90 %! Imagu, se vi devus suferi tian reduktiĝon de via salajro. Do vi povas kompreni, ke li nun estas vere mizera malriĉulo.

Eble tamen li estis tiel prudenta, ke li investis sian antaŭe perlaboritan monon en tabak-kompanioj. Tion faris usonaj sanasekuraj kompanioj, kiuj aĉetis tabakakciojn je entute 4,5 miliardoj da dolaroj. Kiel oni povas legi sur



cigaredskatoletoj, fumado mortigas. La sanasekuraj kompanioj do profitas ne nur pro vendado de tabako, sed ankaŭ pro fruaj mortoj de siaj klientoj, al kiuj ili ne devas pagi en okazo de malsaniĝo. Sed krome ili postulas de fumantoj kotizojn pli altajn, ol devas pagi nefumantoj. Vere ruza negocado, ĉu ne? Ĉar fumantoj laŭ la usona statistiko mortas ĉirkaŭ dek jarojn pli frue, ol aliaj, kaj do ne atingas aĝon, en kiu oni kutime suferas malsanojn.

Usona enirmonon

Ho jes, Usono ĉiam denove super-surprizas nin per kuriozaĵoj. Nun ĝi volas postuli de eksterlandaj vizitantoj enirmonon de dek dolaroj. Germanoj konas tion: Germana Demokratia Respubliko postulis de okcidentaj vizitantoj enirmonon de 25 (okcident-germanaj) markoj por ĉiu tago; kompanse oni ricevis tamen 25 malpli valorajn orientajn markojn. 20 jarojn post tiu socialisma negoco do nun kapitalisma Usono aplikas tiun ĉi eksmodan metodon por enspezi monon, kiun ĝi, cetero, volas investi por akceli turismon, ĉar venas pli kaj pli malmultaj eksterlandanoj. Mi havas kelkajn problemojn por kompreni tiun ĉi logikon. Ŝajnas al mi, ke kolizias celo kaj rimedo.

Misteraj estis ĉi-jare ankaŭ aliaj kolizioj. Ekzemple la 10an de februaro en la kosmo koliziis du satelitoj. Unu estis satelito de la reto *Iridium*, kiu mond-vaste ebligas poŝtelefonadon. La alia estis eksa rusa telekomunika satelito. Ambaŭ detruigis komplete kaj je hororo de kosmofakuloj poste disvastiĝis rubaĵnubegojn, kiuj povas damaĝi aliajn satelitojn. Naive mi imagis, ke la kosmo estas tiom vasta, ke praktike

ne eblas tiaj akcidentoj. Sed nun mi legis, ke tie ŝvebas ne malpli ol 600 000 rubaĵeroj de eksaj kosmaj aparatoj. Kaj pro tio la internacia kosmostacio dum dek jaroj devis jam ok fojojn ŝanĝi sian itineron por eviti kolizion.

Preskaŭa atomkatastrofo

Simile tute neprobabla estas kolizio de submaraj ŝipoj en vasta oceano, tamen ankaŭ tio okazis, same komence de februaro. Tiam tuŝis unu la alian franca kaj brita submaraj koloso (140 kaj 150 metrojn longaj) kun atomarmiloj. Normale tio ne eblas, ĉar submaristoj en silenta maro kutime aŭdas la motorbruon de alia ŝipo. Estas miraklo, ke la du averiintoj nur devis esti riparataj, sed ne okazis atomkatastrofo. Mallaŭteco povas kaŭzi problemojn ankaŭ surtere. Ju pli multaj elektroaŭtoj trafikos sur la stratoj, des pli granda estos danĝero por piedirantoj kaj biciklistoj, ĉar ili ne aŭdas la senbruaĵn veturilojn. Tial oni nun instalas en elektroaŭtoj laŭtparolilojn, kiuj ellasas pseŭdan motorbruon, por tiel averti ne nur blindulojn, sed ankaŭ aliajn homojn, por ke ili povu eviti koliziojn. Absurda ideo? Eble ĝi povas savi vivojn, sed ni ne revu pri senbrua trafiko, kiel en Ĉinio, kie ankoraŭ plej multaj trafikiloj estas senbruaĵn bicikloj.

Tiu ĉi populara popolrespubliko en 2009 pompe festis sian 60-jaran jubileon. Kiom ĝi prosperis dum tiu longa periodo, oni povas ekkoni per eldiro de infano. Ĉina etulo al la demando, kiun profesion li alstrebas, respondis: „Mi volas fariĝi korupta ŝtatoficisto.“ Ni deziras al la klarvida etulo, ke la plano realiĝu, je lia feliĉo kaj tiu de Ĉinio. ■

Demokratio kontraŭ minaretoj



Moskeo de la turka kultura asocio de la distrikto Olten, en Svislando.

Antaŭ la fino de la jaro svisaj civitanoj estos decidintaj pri eventuala aldono de unusola frazo al la konstitucio: „Estas malpermesite konstrui minaretojn.”

Rekta demokratio estas karakterizaĵo de Svislando, sed ĝia vera funkciado estas malpli konata. Por pli bone kompreni la aferon, indas konscii du aspektojn. Unue, la konstitucio povas esti ŝanĝita nur pere de referendumo (kontraste al multaj aliaj eŭropaj landoj). Due, civitanoj mem povas rekte proponi ŝanĝojn, se ili kolektas skriban subtenon de 100 000 civitanoj (en lando kun entute ĉirkaŭ kvin milionoj da civitanoj). Pro tio civitanoj povas mem decidi pri sia konstitucio.

Internacia juro

Dum la somero de 2009 pli ol 100 000 civitanoj subtenis proponon malpermesi konstruadon de minaretoj. La registaro kaj la parlamento rapide deklaris sian malaprobbon, sed ne povis eviti referendumon. Por tion preventi, la aŭtoritatoj estus devintaj montri, ke la proponita teksto lezas internacian juron. Tion ili ne montris.

Tiuj konstituciaj proponoj (nomataj „iniciativoj”) ofte venas ne de simplaj civitanoj. Kutime politikaj partioj, gravaj asocioj aŭ sindikatoj iniciatas tiajn klopodojn. Membroj de la Svisa Popolpartio (naciista kaj konservativa) proponis la iniciativon kontraŭ minaretoj. Tiu ĉi partio antaŭ nelonge floris, oponente la

Eŭropan Union kaj eksterlandajn enmigrintojn. Krom tio ĝi estigas malamikaĵojn sintenojn kontraŭ islamanoj, malgraŭ ilia relative bona integriĝo en la lando.

Islamanoj

Islamanoj nombras iom pli ol 300 000 en Svislando (el 7,5 milionoj da loĝantoj: granda nombro da loĝantoj fakte ne estas civitanoj). Ili ne formas unuecan komunumon, pro siaj tre diversaj devenoj, lingvoj kaj kutimoj. Plejparte ili devenas el Balkanio kaj ne observas tre striktan islaman „reĝimon”.

Nuntempe ekzistas nur kvar minaretoj en Svislando kaj nur unu nova estas proponata. Aldonendas, ke ĉiuj tiuj minaretoj estas silentaj (neniu muezino alvokas homojn). Tamen klaras, ke la demando pri minaretoj ne gravas en Svislando kaj ke la naciistoj trovis tie bonan okazon varbi pri siaj temoj.

Nuntempe demandoj pri integriĝo de islamanoj ofte aperas en eŭropaj landoj. Sed nur en Svislando eblas tiel simple rekte peti konstitucian malpermeson konstrui novajn minaretojn. Plue eblas imagi, ke aliaj similaj proponoj sekvos tiun ĉi iniciativon.

Arkitekturaj ornamaĵoj

Oponentoj de la iniciativo opinias, ke minaretoj estas nuraj arkitekturaj ornamaĵoj. Kontraŭe, subtenantoj de la malpermesa propono certas, ke tiaj konstruaĵoj estas iloj por invadi kristanajn landojn. Diskutoj preskaŭ ne plu eblas pri tiuj malsamaj vidpunktoj.

Formala religia libereco ne estus endanĝerigita pro la malpermeso, sed restas la problemo, ke nur unu religio alfrontus malpermeson de siaj konstruaĵoj. Aldone, tiaj religiaj demandoj kutime estas decidataj de la kantonj (provincoj de Svislando) en tiu ĉi plurreligia lan-



Ege ofendaj kaj insultaj estas la afiŝoj publikigitaj de oponantoj de minaretoj en Svislando.

do. Do la propono, se akceptita, donus novan kompetenton al la nacia federala ŝtato kontraste al malnovaj tradicioj.

Provokaj afiŝoj

Kompreneble indas debati religiajn temojn. Tamen restas la ĉefa impresoj, ke demagogia partio provas uzi demokration por firmigi ksenofobion. Krom tio, la proponantoj pretigis ege provokemajn afiŝojn, nurajn karikaturojn de islamo. Kiam oni montras tiujn afiŝojn en islamaj landoj, malfacilas klarigi, ke tio estas parto de normala demokratia diskuto.

Ankoraŭ precizigendas, ĉu tiuj afiŝoj estos malpermesitaj en kelkaj urboj. Kompreneble sekvis diskuto en ĵurnaloj pri la libereco sin esprimi. Ĉiaokaze, se la propono estos akceptita, Svislando estos la sola okcidenta lando, kiu malpermesas minaretojn. Malfacilas al la svisa registaro tion komprenigi al eksterlando. Sekvos eble problemoj por la svisa komerco.

Politikaj diskutoj

La rolo de religioj en la socio estas taŭga demando. Sed la riskoj, kiuj



Moskeo de Mahmud en Zuriko

prezentiĝas pro politikaj diskutoj tiaj, povas esti grandaj por la bildo kaj sekureco de Svislando. Tiuj, kiuj deziras alfronti islamajn movadojn, nun faris unu paŝon en tiu direkto.

Esperable ne sekvos perfortaj reagoj. Svislandaj civitanoj kutimas rifuzi tiajn

ekstremajn proponojn, kaj estus malpezigo por la instancoj, se ĉio tiel finiĝos. Larĝaj rajtoj estas granda riĉeco en demokratio, sed ili povas esti misuzataj de provokistoj dezirantaj starigi homon kontraŭ homo.

Daniel SCHOENI BARTOLI

JAPANIO

Ŝanĝoj okulfrapaj

Post la venko de la Demokratia Partio (DP) en la ĝenerala elekto, Hatojama Jukio estis elektita meze de septembro la 93a ĉefministro de Japanio. La nova ministraro konsentis pri du bazaj principoj: „realigo de vera popola suvereneco” kaj „realigo de enhavoriĉa regiona suvereneco”. Kunligitaj estas tri sloganoj: „memstaro kaj kunvivado”, „rekreo de sociaj ligiloj” kaj „frateca socio”.

Registaro gvidata de la Demokratia Partio estas historia evento. Dum la pasin-

taj 50 jaroj la Liberala Demokratia Partio (LDP) preskaŭ ĉiam regis Japanion. Tiu regado ŝajnis eterne daŭranta kaj ĝis la 90aj jaroj japanoj ne aparte interesiĝis pri politiko. Ili kontentis, vivante en paco kaj en ekonomia progreso.

Enketoj

Tamen iom post iom malaperis la optimismo kaj ĉi-jare japanoj elektis novan registaron, esperante pri pli homeca socio. Malgraŭ tio, ke laŭ enketoj preskaŭ duono de la japana popolo kredis, ke ne



WORLD ECONOMIC FORUM / KOORI NISHIDA

Hatojama Jukio estis elektita meze de septembro la 93a ĉefministro de Japanio.

multo draste ŝanĝiĝos, tamen jam okazis kvazaŭ „revoluciaj” paŝoj politikaj.

La plej okulfrapa koncernas la ĉesigon de la konstruado de la digo Janba en la gubernio Gunma. La digo estis planita en 1952 kaj estus preta en 2015. Ĝi estas jam ĝis 80 % komplota, sed la nova registaro taksas la konstruadon misuzo de la ŝtata buĝeto. Ĝi konsumis jam la ekvivalenton de 3,5 miliardoj da eŭroj.

Maljunuloj

Ankaŭ leĝoj, kiuj mizerigis la vivon de japanoj dum la periodo de LDP, estos nuligitaj. Ili inkluzivas la leĝon „Helpo al handikapitoj”, kiu fakte ne helpis, sed trudis pli da elspezoj rilate prizorgadon. Ankaŭ la tiel nomata nova kuracada sistemo estos nuligita: tiu ĉi sistemo malaltigis la buĝeton por flegi maljunulojn kaj fariĝis unu el la kaŭzoj de la malvenko de LDP.

Refarota estas la leĝo „Helpo al solpatrinaj”, kies aldona subvencio estas nuligita. Populara estas ankaŭ promeso malaltigi la ellasojn de karbona monooksido. LDP promesis 8-procentan malpliigon; la nuna registaro de Hatojama Jukio 25-procentan.

Promesitaj estas ankaŭ aliaj reformoj kaj novaj leĝoj. Kun espero do japanoj nun spektas televidon kaj legas ĵurnalojn.

HORI Jasuo

Hatojama Jukio: nova ĉefministro

Hatojama Jukio naskiĝis en februaro 1947 al elita familio. Praavo rolis kiel prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj; avo fariĝis ĉefministro kaj sukcese starigis diplomatajn rilatojn inter Japanio kaj Sovetio; lia patro estis ministro pri eksteraj rilatoj.

Jukio studis administradon en Tokio, poste ĉe Stanford en Usono. Tie li renkontis sian nunan edzinon Mijuki, eksan aktorinon. En 1976, en Usono, li entuziasmiĝis pri la 200-jara datreveno de Usono kaj decidis fariĝi politikisto.

En 1986 li estis elektita kiel deputito de la Liberala Demokratia Partio (LDP). En 1993 li forlasis LDP-on kaj aliĝis al grupo, kiu celis fondi novan partion – la Demokratian Partion. En junio 2009 li estis elektita kiel partia prezidanto. Liaj devizoj estas „frateco” kaj „amikoj en pluvo” (valoraj estas amikoj, kiuj helpas eĉ dum malavantaĝaj situacioj).

Ponto

En septembro ĉi-jare li prelegis ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Li diris: „La mondo alfrontas diversajn malfacilaĵojn. La

novnaskita Japanio ne fuĝos el tiuj. Surbaze de la spirito de ‘frateco’, mi klopodas, por ke Japanio estu ponto inter Oriento kaj Okcidento, inter progresintaj landoj kaj progresantaj landoj, inter diversaj kulturoj.”

„Nun Japanio devas plenumi kvin defiojn: la unua estas batalo kontraŭ la monda ekonomia krizo, la dua estas luktado kontraŭ tutmonda klimatsanĝo, la tria estas reduktado de nukleaj armiloj, la kvara estas paco, ekspluatado kaj malriĉeco en la mondo, kaj la kvina estas la fando de Orient-Azia Unio.”

Menciindas la tria defio. Kiel diris la nova ĉefministro, kvankam Japanio posedas la kapablon krei nukleajn armilojn, ĝi fidelas al la principoj ilin nek posedi, nek enkonduki, nek produkti.

Tiu ĉi mesaĝo multe kuraĝigis japanajn atombomb-suferantojn kaj, post epoko, kiam Japanio emis sekvi Usonon kvazaŭ kolonio, la ĉefministro mesaĝis al la mondo, ke enkondukata estas nova erao en la japana politiko.

Enlanda eksterlanda politiko

Antaŭ jaroj la tiama karintia provincestro Jörg Haider [hajde], pasintjare formortinta, serioze proponis ŝanĝi la konstitucian statuson de la



Jörg Haider en kunveno de BZÖ en Spittal an der Drau la 30an de septembro 2006.



BERNHARD LATZKO

sud-aŭstra provinco Karintio (Kärnten / Koroŝka), por ke ĝi fariĝu tiel nomata libera ŝtato Karintio (germane: *Freistaat Kärnten*). Tiel li sekvis la modelon de la sud-germana Bavario.

Haider ne atendis plenumon de sia ideo, sed li tuj ekpraktikis sian propran eksterlandan, aŭ eksterŝtatan, politikon, kiu ne tre kongruis kun la eksterlanda politiko de la vera libera ŝtato Aŭstrio. Tiel li havis amikajn rilatojn kun la tiama iraka diktatoro Husejn, kiun li vizitis. Cetere li intime amikiĝis kun filo de la libia diktatoro Gadafi.

Haider ne vivis sufiĉe longe por kompletigi siajn internaciajn rilatojn kaj tiel igi la eksterlandan politikon de sia provinco vere ŝtateca kaj tiel arigi argumentojn por la estonta libera ŝtato, aŭ respubliko, Karintio.

Ekzpozicio

Lastatempe la prezidanto de la provinca parlamento en Karintio, Josef Lobnig, ano de la posthajdera partio BZÖ, permesis uzi galerion en la provinca domo *Klagenfurter Landhaus* por malfermi ekspozicion pri fotomaterialo el norda Koreio, farita de la aŭstra fotisto Wolfgang Bogner, sub pompa titolo

„Malkovro de imperiisma mensogo-propagando pri Nord-Koreio”.

Intenco kaj tendenco de la ekspozicio estas argumenti, ke Nord-Koreio estas ordigita ŝtato, en kiu ne troviĝas malsataj homoj, almozetantoj kaj fremduloj. Tiel plenumiĝas la franca dirmaniero „ekstremoj tuŝas unu la alian”. Tiamaniere funkciulo de ekstremdekstra partio disponigas ŝtatan proprajon por montri ideologian propagandon favore al unu el la plej krimaj reĝimoj, kiuj iam ekzistis en la mondo.

Antaŭjuĝoj

Interesa apudinformo: la sama amiko de nord-koreaj cirkonstancoj komence de julio malpermesis uzi la saman ejon por reprezentantoj de la Eŭropa Parlamento. Ili volis honori grupon, kiu interparolante kaj malkonstruante antaŭjuĝojn provas solvi la lingvan kaj etnan problemaron de karintiaj slovenoj.

Tial la vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento, Miguel Angel Martinez, ne ricevis permeson atribui la Eŭropan Civitanan Premion al grupo, kiu forlasis la malbonan karintian tradicion de nacisocialismo.

Vinko OŠLAK

LITOVIO

Ofendas „humuro“

„Transdonu la administradon de Litovio al Skandinavio“ – tia teksto videblas ĉe reklamejoj tra Litovio. Sur afiŝoj aperis ankaŭ mapoj, sur kiuj la nomoj de litovaj urboj estas skribitaj kun skandinavaj finaĵoj.

Tiamaniere la iniciatintoj de la reklamo-kampanjo volis atentigi, ke skandinavaj landoj bone regas sian ekonomion kaj ke litovoj lernu de siaj najbaroj. „Ni observas, kaj jen imitinda ekzemplo“, opinias la estrino de la kampanjo.

Tamen la reklamoj ofendis kelkajn litovojn. La estro de la socialdemokrata partio koleris kontraŭ la ofenda stilo de



Afiŝoj invitas litovojn transdoni la administradon de la lando al skandinavoj.

la afiŝoj. „Ŝajnas, ke ni estas malkleraj, needukitaj kaj malkompetentaj memstare administri nian landon“, li diris. Alia parlamentano eĉ taksis la kampanjon kontraŭkonstitucia, pro la propono fordoni la landon al Skandinavio.

Defendis la iniciaton ĝia estrino. „La formo de la reklamo estas nur humuro.

Propravole rezigni pri la administrado kaj fariĝi ies kolonio estas absurdaĵo. Normale ajna varbado provokas simpatian kaj koleron“, ŝi diris, aldonante, ke la protektanto de la iniciato estas la prezidantino de Litovio.

LAST

ALBANIO

Ridinda aserto

Lastatempe aperis nova eldono de slavmakedona enciklopedio, kompilita de la Akademio de Sciencoj de Makedonio sub la aŭspicio de la registaro. Enestas, kiel atendite, multaj malveroj historiaj kaj politikaj. Eĉ diplomatatoj de la brita kaj usona ambasadoj en Skopje protestis pro la aserto, interalie, ke dum la ribelo albana en la jaro 2001 la naciliberigaj taĉmentoj de la popola armeo estis trejnitaj de usonbritaj spertuloj militistaj. Tio ne veras.

Plej bedaŭrinde, la slavmakedonaj t.n. sciencistoj insistas pri siaj malveraj ŝovinismaj tezoj kontraŭalbanaj rilate la loĝantaron en tiu ĉi multetna lando. Ili skribas, ke albanoj, kiuj laŭ lastaj donitaĵoj konsistigas ĉ. 26 % de la popo-

lo, estas alvenintaj el norda Albanio, do ne aŭtotonas en la respubliko.

Tio certe malveras. Estas pruvite, ke albanoj estas posteuloj de iliroj kaj pelasgoj, okupintaj vastan teritorion de Danubo ĝis la Adriatika kaj Ionia Maroj, inkluzive de la nuntempa Makedonio. La antikva sciulo Strabono (63-20 antaŭ la komuna erao) notis en la sepa volumo de sia *Geografio*, ke „iliroj kaj makedonoj parolas saman lingvaĵon [kaj] havas similajn morojn kaj kutimojn“.

Statistikoj

Slavoj alvenis nur post la 6a jarcento. Dum la tuta tempo albanoj konsistigis plimulton, aparte en Okcidenta Makedo-

nio. Laŭ statistikoj de la jaroj 1921 kaj 1941 albanoj konsistigis ekzemple 70 % en Gostivar, 60 % en Diber (Debar), 43 % en Shkup (Skopje), 88 % en Tetovo (Tetovo), 52 % en Struga, ktp.

Ĝis antaŭ kelkaj jardekoj, Skopje estis la urbo kun la plej granda nombro de albanoj en ĝi. Hodiaŭ loĝas tie pli ol 200 000 albanoj. Tamen, laŭ retpaĝoj kompilitaj de la makedona registaro, legeblas, ke Skopje konsistas el slavmakedonoj, islamanoj, turkoj kaj malmulte da albanoj.

Ridinda aserto! Certe oni konsideras albanojn, kiuj plejmulte apartenas al la islama religio, simple islamanoj aŭ turkoj.

Bardhyl SELIMI

Ĉu amnestio kondukos al paco?

Dum la lastaj jardekoj la niĝerdelta regiono de Niĝerio restas militejo. Kulpas ĉefe la federacia registaro, kiu daŭre neglektas la popolojn de regiono, el kiu venas nafto, la ĉefa enspezilo de Niĝerio.

La Organizaĵo de Petrol-Eksportantaj Landoj (OPEL) permesas al Niĝerio, la sese plej granda lando laŭ nafto-rezervoj, produkti tage tri milionojn da bareloj da nafto. Sed malgraŭ ke pli ol 90 % de la landaj enspezoj devenas de nafto, la popolo, kaj aparte la civitanoj de la niĝerdelta regiono, restas malriĉaj.

Ili suferas de diversaj katastrofoj kaŭzitaj de internaciaj nafto-kompanioj kiel Shell, Mobil, Chevron kaj Texaco. Bienoj kaj precipe riveroj estas poluitaj de la kompanioj: ofte riveroj prezentas la solan manieron akiri akvon por trinki kaj por aliaj ĉiutagaj bezonoj. Samtempe mortas la fiŝoj pro ĥemiaĵoj, kiujn la kompanioj ellasas en la riverojn.

Detruitaj

Dum estas detruitaj tutaj vilaĝoj, kune kun bienoj kaj aliaj sociaj kaj kulturaj havaĵoj, mankas malsanulejoj, lernejoj, bonaj ŝoseoj ktp, fakte ĉio por montri, ke la tiea popolo produktas kaj posedas la riĉaĵon de Niĝerio. Tial mortas la loĝantoj de la niĝerdelta regiono pro neglekto kaj pro ekologiaj problemoj, dum la nafto-enspezojn la federacia registaro aplikas en la nordaj ŝtatoj.

Niĝerdeltanoj, kiuj dum la epoko de la armeaj reĝimoj protestis, kiel Ken Saro Wiwa, estas mortigitaj. Dum la lastaj 10 jaroj da ŝajn-demokratio nenio ŝanĝiĝis. Eksa prezidanto Olusegun Obasanjo sendis soldatojn en 1999 al la niĝerdelta urbo Odi kaj mortigis ĉiujn loĝantojn kaj detruis la urbon, ĉar la loĝantoj, protestante kontraŭ esploroj de la nafto-kompanioj, mortigis unusolan soldaton.



En la lastaj jaroj mortis miloj en la regiono, kiu fariĝis unu el la plej malsekuraj en la mondo. Diversaj militistoj, moderne armitaj de eksterlandaj niĝerdeltanoj, daŭre luktas kontraŭ soldatoj de la federacia registaro.

Liberigitaj

Parte pro la malstabileco multaj internaciaj kompanioj, kies laboristoj estas kaptitaj kaj liberigitaj nur post pago de grandaj monsumoj, ĉesis esplori. Ne nur eksterlandaj dungitoj, sed ankaŭ niĝerianoj estas tiel minacataj. Rezulte falas nafto-enspezoj. Lando kapabla produkti tage tri milionojn da bareloj da nafto liveras fakte nur 700 000.

Reage al la situacio, kaj spite al la volo de politikistoj kaj tradiciaj regionaj reĝoj, kiuj profitas de la malordo, la registaro lastatempe deklaris amnestion kaj promesis krei ministerion taskitan rekonstrui la regionon. Komence neniu fidis la registaron, sed parte pro la internacia komunumo la amnestio ekefikus. Liberigitaj estas enprizonigitaj militistoj, dum tiuj ankoraŭ liberaj fordonis siajn armilojn al federaciaj soldatoj.

La popolo nun atendas por vidi, ĉu la federacia registaro plenumos ĉiujn siajn aliajn promesojn rilate la regionon. Eble tamen fine revenos paco al la niĝerdelta popolo.

Princo Henriko OGUINYE/pg

La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono. Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, butiko@fel.esperanto.be aŭ www.retbutiko.net kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

Enigmoj de Sanxing



Sanxingdui troviĝas en la urbo Guanghan, 40 kilometrojn norde de Ĉengduo, ĉefurbo de la ĉina provinco Siĉŭano. Ĝi ricevis la nomon pro tri altaj kaj krutaj ter-amasoj sur vasta ebenaĵo. Tie arkeologoj trovis ruinojn de antikva urbo kun areo de 12 kvadrataj kilometroj kaj elfosis grandan kvanton da bronzaĵoj, jadaj kaj oraj objektoj. La loka registaro konstruigis grandiozan muzeon tie kaj petas listigi la ruinojn kiel Mondan Heredaĵon.

Printempe de 1929 loka terkulturo Yan Daocheng trovis kavon, masonitan per ŝtonoj, kiam li fosis apud sia domo. El ĝi li elfosis pli ol 400 deli-



katajn jadaĵojn. Tio altiris atenton de kuriozaĵistoj kaj arkeologoj, kaj baldaŭ komenciĝis prifosado. En 1986 brikejaj laboristoj trovis jadan ringon, kiam ili prenis argilon. Informiĝinte pri tio, arkeologa teamo komencis esploron kaj trovis du grandajn kulteĵojn de la dinastio Shang (17a jarcento – 11a jarcento antaŭ nia erao). El ili oni elfosis pli ol 1700 objektojn el bronzo, jado, lako, argilo aŭ oro, 80 el eburo, pli ol 4600 monerojn kaj grandan kvanton de konkaĵoj.

Fontoj de la civilizacio

La arkeologia eltrovo ŝajne renverŝas la konkludon de ĉinaj historiistoj kaj



arkeologoj, kiuj ĝenerale opinias, ke la ĉina civilizacio fontis de la baseno de la Flava Rivero kaj disvastiĝis al la tuta lando. Sed la ruino atestas, ke ankaŭ la baseno de Jangzio estas fonto de la ĉina civilizacio, kaj pruvas la notojn de historiaj dokumentoj pri la regno Shu. Antaŭ 5000 ĝis 3000 jaroj tie estis ĉefurbo de la regno kaj kultura centro interkomunikata kun la meza kaj malsupra baseno de la Flava Rivero.

Sed oni ne scias, kial la regno forlasis la ĉefurbon, kaj la brila civilizacio subite ĉesis. Antaŭ kelkaj jaroj la malkovro de antikva ruino en Jinsha, proksima al la provinca ĉefurbo Ĉengduo, inspiris arkeologojn: objektoj elfositaj el la du lokoj estas mirinde similaj. Iuj opinias, ke la civilizacio de la ruino Jinsha, pli malfrua je 500 aŭ 1000 jaroj, eble estas la daŭro de tiu de Sanxingdui. Aliaj konjektas, ke la regno translokiĝis de Sanxingdui al Jinsha pro milito, inundo aŭ pesto. Sed la kaŭzo restas nekonata pro neniu atesto.

Enigma aspekto

Enigmaj estas ankaŭ multaj objektoj elfositaj el la ruino de Sanxingdui. Plej mirindaj estas homfiguraj bronzaĵoj kun grandaj okuloj kaj alta nazo, la aspekto estas diferenca de orient-azianoj. Ili spegulas eminentan metilertecon. Iuj specialistoj opinias, ke la elfositaj objektoj reprezentas kulturon de la gento Qiang, kiu loĝas en la gubernioj Beichuan kaj Pingwu kaj konservas animisman kaj fetiĉisman religion. Tamen aliaj suspektas, ke la bronzaĵoj estas kombinoj de la ĉina kulturo kun iu fremda, ĉar sur ili estas neniu skribo krom desegnoj malsamaj ol tiuj trovitaj en aliaj lokoj de Ĉinio.

En la sama loko oni elfosis ankaŭ grandan kvanton da eburaĵoj kaj maraj konkaĵoj. Tio estas tre malfacile imagebla, ĉar la provinco Siĉŭano situas for de la maro, kaj tie neniam vivis elefantoj. Iuj opinias, ke la eburo enkondukiĝis laŭ la suda Silka Vojo, kaj oni transportis tien ankaŭ marajn konkaĵojn. Ĉu tiam komerco de la regno Shu jam etendiĝis al okcident-azia kaj sud-azia regionoj?

Alice Liu

NEPALO

Fina venko

Kiam floris la brita imperio, la novaj eŭropaj mastroj okupis interalie okcidentan Nepalon inkluzive de la regiono Gorka (kiun anglalingvanoj, parenteze, emas erare prononci „gurka”¹⁾). Tie la britoj trovis homojn fidelajn kaj sincerajn, kiuj aparte taŭgis kiel soldatoj kaj gardistoj. Gorkanoj pretis morti por protekti siajn novajn regantojn, kaj tial la britoj volonte ilin dungis por batali por la imperio.

En la daŭro de la tempo gorkanoj fariĝis tre valoraj kaj utilaj. Britoj uzas

ilin por plej danĝeraj militaj taskoj. Oni ne scias, kiom da gorkanoj mortis en mondaj militoj: neoficiala statistiko indikas, ke pereis en Eŭropo kaj aliaj mondopartoj pli ol du milionoj.

Fidele

Fakte, gorkanoj tiel kuraĝe servas, ke ili ricevis 14 tiel nomatajn viktoriajn krucojn, la plej altan honoron, kiun povas ricevi brita militisto. Sed, malgraŭ tio, ke gorkanoj fidele servas Brition dum multe pli ol unu jarcento (ekzem-



Gorkoj en Falklandoj.

Grupo de gorkoj laŭ bildo komisiita de William Fraser la jaron 1815 dum li estis Vicreprezentanto de Delhio.



ple dum la dua mondmilito kaj ankaŭ nuntempe), ili ricevis nur sesonon de la salajro de brita soldato. Tiamaniere bone profitis Britio. Gorkanoj do petis, ke ili estu dungataj kaj pagataj same kiel britaj soldatoj.

Unue lamis ilia kampanjo, ĝis populara brita aktorino, Joanna Lumley [ĝoana lámli], ekpredis por la gorkanoj. Ŝia patro iam laboris kun gorkanoj kaj sciis, kiel kuraĝe ili batalis. La kampanjo fine sukcesis, kaj la brita registaro akceptis, ke gorkanoj ricevu saman salajron kiel britoj kaj estu akceptataj en Britio kiel britoj. Do, kiam Lumley vizitis Nepalon, ŝi estis bonvenigata kvazaŭ filino de gorkano.

Navin Lal SHRESTHA/pg

1. Kaj verŝajne ankaŭ pro tio PIV parolas pri „gurkoj” anstataŭ pri „gorkanoj”.



Britaj gorkoj en komuna ekzercado inter brita kaj usona armeoj, en 1996.

FAMILIOJ

Al genepoj nepras geavoj

Antaŭ vespermanĝo ĉe la pordoj de infanĝardenoj amasiĝas maljunuloj por akcepti siajn genepojn al sia hejmo. Ili ne nur preparas manĝojn por sia tuta familio, sed ankaŭ faras preskaŭ ĉiujn hejmlaborojn, inkluzive de prizorgo pri siaj genepoj.

Dum mia infaneco zorgis pri mi mia avino, ĉar miaj gepatroj devis labori ĉiutage ekde tagiĝo ĝis sunsubiro. Antaŭ mia naskiĝo mia avo jam forpasis, do mi neniam vidis lin, eĉ ne lian foton. Tio estas granda bedaŭro por mi. Tiam mia avino, kvankam pli ol 60-jara, devis ne nur zorgi pri mi, sed ankaŭ fari kamplaboron laŭ sia kapablo, ĉar ni estis kamparanoj. Kvankam la vivo estis malfacila kaj malriĉa, mi sentis min feliĉa, ĝuste pro tio, ke mi estis bone zorgata de miaj avino kaj gepatroj.

Granda ĝojo

Mi demandis al mia patro: „Kiam vi sentis vin plej ĝoja dum via tuta vivo?”. Li respondis senhezite: „Dum mi kaj via patrino zorgis pri via filineto, ĉar la knabineto donis grandan ĝojon al ni ja multe.” Lia respondo estis ekster mia atendo. Jes, mia filino estis bone zorgata de miaj gepatroj dum ŝia infaneco, ĉar mi kaj mia edzino laboris en urbo ĉ. 50 km for de mia hejmloko. Tiam ankaŭ miaj gepatroj estis pli ol 60-jaraj. Nun mia filino estas 15-jara knabino kaj, kvankam mia patro forpasis antaŭ ok jaroj, ŝi ankoraŭ bone memoras lin.

Nuntempe maljunuloj, ofte emeritoj, kiuj restas hejme, tamen multe helpas al siaj gefiloj. Do ankaŭ ili ludas grandan rolon en sia familio, kvankam kun granda aĝo.

Xu Jinming/pg
Ĉinio



GORDANA ADAMOVIĆ-MILADENOVIC

AVIADO

Fluge al agnosko



James Berisha [ĝejmz beriŝa] estas usonano deveninta de Kosovo. Lastatempe li planis viziti per sia privata aviadileto 84 flughavenojn en Suda Ameriko, por ke tieaj ŝtatoj agnosku la sendependecon de sia iama patrujo. Nun nur 60 landoj en la mondo akceptas sendependan Kosovon. Sur la aviadilo staras grandlitere: „Agnosku la sendependecon de Kosovo”.

Jam dum la milito en Kosovo 1998-1999 albanaj elmigrintoj, kaj ankaŭ gejunuloj naskiĝintaj en Usono, fondis

specialan taĉmenton „Atlantik”, kiu eniris Kosovon por defendi la popolon kontraŭ la ŝtata genocido de la tiama miloŝeviĉa reĝimo. Aliaj kosovanoj en Usono kaj aliloke kolektis monon kaj armilojn, kiujn ili sendis al Kosovo por subteni la liberigan militon.

Iasence la propagando de Berisha daŭrigas ĉi tiun tradicion pri eksterlanda helpo. Por informi pri la iniciato la aviadisto kreis retejon www.flyingforkosovo.com.

Bardhyl SELIMI



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponojn nun ĉe Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Mikrokreditoj: ĉu helpo aŭ trompo?

En la jaro 2006 la Nobel-premio pri paco estis transdonita al la bangladeŝa ekonomikisto Muhammad Yunus kaj la *Grameen Bank* iniciatita de li. Tio estis rekono de mikrokreditoj, sistemo de etskala kreditdonado al malriĉaj personoj, kiuj ne kapablas pruntepreni monon de banko. La bangladeŝa ekzemplo estis imitata en multaj landoj, sed kritikantoj plioftiĝas.

Laŭ la entreprena historio, Muhammad Yunus, diplomito de la usona *Vanderbilt University* kaj profesoro ĉe la Universitato de Chittagong, en 1974 pruntedonis egalvaloron de 27 dolaroj al grupo de 42 familioj por ebligi al ili la produktadon kaj vendadon de etaj iloj. Normale, tiuj personoj povus akiri monon nur de uzuristoj. La persona iniciato de Yunus evoluis al esplorprojekto de lia universitato, kaj en 1983 estis kreita la sendependa *Grameen* („vilaĝa”) *Bank*. En tio helpis la registaro, *ShoreBank*, malgranda usona banko, kaj *Ford Foundation*.

Solidareco

Baza (sed ne ĉiam aplikata) principo de mikrokreditoj estas ke prunteprenanto devas aparteni al grupo de pluraj personoj. La aliaj grupanoj neniel jure garantias la ŝuldon, sed praktike tamen la grupo iel atentigas, ke la prunteprenanto bone kondukas kaj ke la mono iam estos repagita. *Grameen Bank* havas klientaron je 97 % inan kaj asertas, ke 98 % de la pruntoj estas repagataj.



Tipa ekzemplo estas sinjorino Mosammatt Taslima Begum, kiu en 1992 prunteprenis 20 dolarojn por aĉeti kaprinon kaj iĝis sukcesa entreprenistino. Ŝi akceptis en 2006 la Nobel-premion nome de Yunus kaj lia banko.

Kritikoj

Malfacilas klarigi al la publiko kial la laŭdire sukcesaj *Grameen*-principoj estas aplikataj kaj laŭdataj tutmonde, dum Bangladeŝo restas unu el la plej malriĉaj landoj de la mondo. Ĉu la tuto estas nur fikcio, vivtenata per propagando kaj mondonacoj, ĉu efektive estas mirakla

metodo aŭ ĉu nur kelkloke estas realaj rezultoj? Jam de jaroj cirkulas duboj.

Meze de julio 2009 la brita revuo *The Economist* aperigis artikolon pri mikrokreditoj bazitan sur esploroj de du universitatoj. *Massachusetts Institute of Technology* (MIT) kontrolis, ĉu profitantoj de mikrokreditoj en la barata urbego Hyderabad post 18 monatoj estis pli bonfartaj ol kontrolgrupo, kiu nenion ricevis. Konkludo: ambaŭ grupoj restis same malriĉaj. Kelkaj personoj fondis entrepreneton, sed plejofte la mono estis uzata por kurantaj familiaj elspezoj. Esploroj de *Yale University* en Filipinoj



►kondukis al simila konkludo. La artikolo ankaŭ aperis sur la retpaĝo de la revuo, sekvis vigla diskuto kaj sekve ankaŭ aliaj informiloj raportis pri la temo, alportantaj pliajn ekzemplojn.

Rezultoj ne tiom brilaj

Ĝenerala konkludo estas, ke mankas fidindaj rezultoj, uzeblaj kiel bonaj ekzemploj. Malfacilas krei kontrolgrupojn, krome la landoj kaj situacioj tre malsamas.

La ĉefa celo (homo ricevas prunton kaj per ĝi kapablas krei profitdonan komercon kaj eskapi malriĉecon) plejofte ne realiĝas. La rento estas altega (ĝis 60 % jare, sed tamen multe malpli ol postulas uzuristoj), ĉar por etaj kreditoj la kostoj de la kreditdonanto estas relative

altaj. Pro tio apenaŭ eblas repagi la tutan ŝuldon, sed je limdato preskaŭ aŭtomate estas donita nova kredito. Eĉ se repago eblus, oni ofte instigas la prunteprenanton fari plian investon kaj preni plian krediton. En ambaŭ okazoj la ŝuldoj dum jaroj restas kaj kreskas, sed la kreditdonanto povas fanfaroni pri granda procentaĵo de repagitaj pruntoj (kvankam reale ili ne estas repagitaj). Ne liberiĝas sufiĉe da kapitalo por helpi aliajn prunteprenantojn. La utilo al virinoj kaj al veraj malriĉuloj estas malpli grava ol kredigas eŭforiaj raportoj. El Barato iu raportis ke en regionoj kie estas pluraj konkurantaj mikrokredit-donantoj, la samaj klientoj prunteprenas de pluraj. Tio eblas, ĉar ne estas iu kupola kontrolinstanco. Subita ŝanĝo de la ekonomia situacio riskas ko-

lapsigi la tutan mikrokreditsistemon de la regiono, ĉar tiaj klientoj ne kapablos repagi pluroblajn ŝuldojn.

Korektoj necesas

Ĉu la individuoj kaj ŝtatoj, kiuj finance subtenas mikrokredit-sistemojn, haltigu siajn donacojn? Tute ne, sed ili kontrolu, ĉu ilia mono vere estas uzata laŭ la originaj ideoj: malriĉuloj eskapu el malriĉeco, post iom da tempo ne plu havu ŝuldojn, sed kontraŭe povu ŝpari. Tiel ekestos kreditsistemo, kiu efike funkcias kaj ne plu bezonas eksteran helpon. La monhelpo estonte iru al mikrofincado, pli larĝa agadtereno, kiu ankaŭ inkluzivas instruadon, konsiladon, asekuron ktp.

Roland ROTSART

BELGIO

Eksporto el Valonio kreskas pli rapide ol el Flandrio



La eksporto el Valonio (la suda, franclingva parto de Belgio) kreskis dum 2008 duoble pli rapide ol el Flandrio (la norda, nederlandlingva parto). La valona eksporto kreskis je 10,7 % ĝis 45,1 miliardoj da eŭroj, dum tiu de Flandrio kreskis nur je 5,5 % ĝis 200,9 miliardoj.

Flandrio pli ol Valonio dependas de la eksporto de aŭtoj kaj diamantoj. Antverpeno estas la tutmonde plej grava diamantcentro kaj la aŭtomuntejoj *Ford Genk*, *Volvo Gent* kaj *Opel Antwerpen* troviĝas en Flandrio. La flandra eksporto de gemoj kaj nerustantaj metaloj falis pasintjare je 2,8 miliardoj kaj la eksporto de aŭtoj je 1,4 miliardoj da eŭroj. La eksporto de tiuj produktoj reprezentas 18,1 % de la tuta eksporto en Flandrio kaj nur 2,7 % en Valonio. Krome la flandra eksporto de zinkaĵoj katastrofis kaj falis je 67 %.

Tamen la flandra eksporto restas plej grava en Belgio. La parto de Flandrio malaltiĝis en 2008 ĝis 79,9 % de la tutbelgia. La porcio de Valonio kreskis al 17,9 % kaj tiu de Bruselo al 2,2 %.

Ankaŭ 2009 anonciĝas kiel malbona jaro por Flandrio. La belga eksporto de aŭtoj kaj diamantoj daŭre falis en la unua jarkvarono de 2009. Aliflanke la aŭtomuntejo de *Audi* (antaŭe de *Volkswagen*) en Bruselo pli bone fartas ol pasintjare.

Ivo DURWAELE

Litovio fermiĝas!

Multaj gastoj de Vilnius, kiuj venis celebri la miljaran ekziston de Litovio, estis ŝokitaj, kiam en la hoteloj je la 22a horo de la 5a de julio 2009 malaperis la lumo. Ĝis la 1a horo matene hotelaj haloj, restoracioj kaj kafejoj dronis en mallumo. Nur kandelaj lumoj helpis orientiĝi.



La mallumiĝo de multaj hoteloj ne signifas, ke ili spertis ajnan difekton de la elektra instalaĵo. Ĉirkaŭ 300 hoteloj de Vilnius kaj de aliaj grandaj urboj de Litovio tiel partoprenis la agadon „Litovio fermiĝas! Ni revenas 1000 jarojn”. Tion atestis afiŝoj en restoraciaj fenestroj, sur kiuj videblis ŝercportreto de la litova ĉefministro Andrius Kubilius, la kapo de blinda kaj surda registaro.

Evalda ŠiškauskienĀ —, prezidantino de la asocio de hoteloj kaj restoracioj de Litovio, klarigis la sencon de tia protesto: „Altigitaj impostoj kaŭzis, ke la alvena turismo malkreskis kaj ke multaj hoteloj kaj restoracioj de la lando trafis en bankrota situacio. Jam 10 000 personoj estis maldungitaj. Tamen la registaro estas surda rilate al niaj argumentoj. Ĝi parolas pri instigo de la entreprenado kaj eksporto, tamen tion penas fari per altiĝo de imposta ŝarĝo por entreprenoj.”

Similaj protestagadoj jam estis organizitaj junie, tamen ili estis senefikaj. ŠiškauskienĀ — aldonis, ke la agadoj daŭros ĝis estos atingitaj rezultoj favoraj por la entreprenado. Gastoj de la hoteloj estos daŭre informataj pri la protestaj agoj kaj malfavoraj kondiĉoj per ekspozicio de diversaj karikaturaj de la aŭtoroj de tiel stultaj decidoj.



Litovaj hoteloj kaj restoracioj protestis per la jena ŝercbildo de la litova ĉefministro.

La hotelojn kaj restoraciojn kaj la tutan alventurisman ĝenas tri ĉefaj problemoj: la malkomforta atingo de Litovio (mankas rektaj flugoj), la impostoj je nmoveblaĵoj ne estas konformaj al la reala situacio, kaj altigita aldonvalora imposto malpermesas konkuradon en la eŭropa merkato. Cetere, ĉi-jare nur du landoj de Eŭropo – Litovio kaj Latvio – altigis aldonvaloran imposton por loĝiga servo ĝis pli ol 10 %. En Eŭropo 20 landoj el 27 aplikas imposton inter 5 kaj 10 %, dum en Litovio hodiaŭ ĝi estas eĉ 19 %.

La ĉefministro ne plu estas optimisma pri la tendencoj de la ekonomio. En majo 2009 li asertis, ke tuj la vivo de la litovoj pliboniĝos, ĉar la registaro sukcesis solvi esencajn problemojn. Tamen li ŝanĝis sian sintenon. Nun li asertas, ke la ekonomio falos anstataŭ je antaŭviditaj 5 % minimume je 15 % aŭ eĉ pli. La Eŭropa Komisiono en majo prognozis falon de la litova malneta produkto je 11 % por la nuna jaro kaj je 4,7 % sekvontjare.

LAST



Kontribuojn por la rubriko **Ekonomio** de **Monato** kunlaborantoj sendu al ekonomio@monato.net.

POLLANDO

Kvin jarojn en Eŭropa Unio

Pasis kvin jaroj ekde la membriĝo je la 1a de majo 2004 de Pollando en Eŭropa Unio (EU). Eblas jam fari la bilancon de la polaj avantaĝoj. Unu el la plej gravaj estas la aliro al financado por la ekonomia disvolviĝo: teknikaj strukturoj, entreprenado, sciencaj esploroj, kreado de novaj laborlokoj, financado de agrikulturo kaj de kamparaj regionoj.

Ekde la 1a de majo 2004 ĝis la fino de majo 2009 ĉiuj transpaĝoj de EU al Pollando atingis sumon de 31 miliardoj da eŭroj. Aliflanke Pollando dum tiu periodo kontribuis al la buĝeto de EU per 14 miliardoj da eŭroj. La bilanco do sumiĝas je pluso de 17 miliardoj entute, aŭ preskaŭ 3,5 miliardoj da eŭroj jare, kio en polaj zlotoj donas imponan sumon de 14 miliardoj. En la jaroj 2004-2007 Pollando ricevis la maksimuman sumon kaj tre bone profitis la eŭropuniajn monrimedojn (PHARE, ISPA, NPR 2004-2006, Fonduson por Kunteniĝo, rimedojn por agrikulturo kaj por kamparaj regionoj). Pollando fa-

ris grandan salton antaŭen en la jaro 2008, kiam ĝi povis akiri grandan kvoton (preskaŭ 20 % de la tuta buĝeto de 70 miliardoj da eŭroj por la periodo 2007-2013) por la realigado de la koheriga politiko.

Pollando ekde sia membriĝo ricevadis ĉiujare pli da mono. En la jaro 2008 tiu tendenco estis haltigita kaj Pollando ricevis la saman sumon kiel en 2007. Ankaŭ la membrototizo de Pollando en EU ĉiujare kreskis. Finfine la saldo de la kontoj kun EU en la jaro 2008 estis je preskaŭ 600 milionoj da eŭroj pli malbone ol en 2007.

STANISŁAW ŚMIGIELSKI

Fonduso por Kunteniĝo

La *Fonduso por Kunteniĝo* (angle *Cohesion Fund*, germane *Kohäsionsfonds*, france *Fonds de cohésion*) estas unu el la financaj iloj, per kiuj EU celas malgrandigi la diferencojn en la disvolviĝo de la regionoj kaj membroŝtatoj. Por la jaroj 2007-2013 la fonduso disponas pri entute 70 miliardoj da eŭroj.

La helpo estas destinita al landoj, kies laŭpersona malneta enlanda

produkto (MEP) estas malpli ol 90 % de la EU-mezumo, kaj estas uzota por infrastrukturaj investoj en mediprotektado kaj transporto.

Ekzistas kelkaj kondiĉoj. La profitanta lando devas mem pagi parton (kutime 50 %) de la subvenciata investo. Se la buĝeta defikito de la lando superas 3 % de la MEP, novaj projektoj ne estas akceptataj.

rr

Praa religia temo

La urso (*Ursus arctos*) estis sankta besto en praa popola kredo kaj en legendoj de la orienta eklezio. Inter la plej gravaj sanktuloj de Karelio estas Sergio (Varfolomej), kiu kun sia frato Stefano konstruis preĝejon en praarbaro. Dividante sian panon kun urso, li malsovaĝigis ĝin.

La mito pri la urso konstruiĝis ĉirkaŭ ideo pri besto, kiu vivas surtere kaj surĉiele. Sur la ĉielo ja videblas la konstelacioj Granda kaj Malgranda Ursino. Laŭ la mitoj de arktaj popoloj la urso naskiĝis en la ĉielo kaj tien ree leviĝas post sia morto. La finna nacia epopeo Kalevala diras, ke la urso estis naskita „ĉe la luno, sub la suno, sur la ŝultroj sepstelaraj” (46a kanto). De tie ĝi estis surterigita en ora lulilo pendanta de arĝentaj ĉenoj. Poste ĝi estis kreskigita ĉe la edzino de la finna arbardo Tapio.

Religiistoj komparas tiun miton kun alipopolaj mitoj pri ĉielaj kaj diaj filoj kaj ties postmorta reveno al la ĉielo. Disvastiĝintaj estas ankaŭ legendoj pri ursoj, kiuj homiĝis, kaj pri homoj, kiuj ŝanĝiĝis en ursojn. Kelklegende la urso edzinigis homan belulinon, kiu poste naskis fortulojn. De ili devenis tuta popolo. La persona nomo Björn (urso) estas ofta ĉe svedlingvanoj. Ĉe finnoj kiel nomo uzatas Osmo (kaŝnomo de urso). Aliflanke ŝajnas, ke parto de la praloĝantoj de Finnlando rigardis sin kiel posteulojn de la alko. Estis kvazaŭ du klanoj, tiu de la urso kaj alia de la alko.

La prafinnoj kaj sameoj ege timis la urson. Ili vivadis kun ĝi en la samaj arbaregoj kaj vivtenadis sin per la samaj beroj, plantoj, kaptaĵoj. De novembro ĝis marto la homoj estis trankvilaj, ĉar la urso dormas tra la vintro en sia nesto. Ekde aprilo kaj precipe somere, kiam la brutaro de la homoj paŝtis sin en la ar-



baro, la homoj timis. Per magiaj vortoj kaj oferaĵoj ili provis konvinki la urson, ke ĝi ne tuŝu ilian brutaron aŭ ilin mem. La homoj kredis, ke nature la urso estas bonvola, sed sorĉistoj povas – pro malamo aŭ envio – instigi la urson ataki homon aŭ ties brutojn. La homoj kredis, ke la sorĉitaj ursoj estas la plej danĝeraj.

La urso pezas 260–350 kilogramojn, kuras kaj grimpas rapidege. Stariĝinta ĝi multe similas al giganta homo, altas 260–270 centimetrojn. Ne eblas fuĝi ĝin. Ĉar niaj prapatroj ege timis kaj respektis la urson, ili nenie kuraĝis uzi ĝian veran finnan nomon „karhu”. Ili nomis la bestegon per ducento da kaŝnomoj flataj. ▶



►admiraj: bulo bela, bulbelulo, mielmano, arbara greno, orkukolo, birdo, karulo, frato, arbara avo, bovo/ĉevalo de arbaro, reĝo drapvestita, belharulo, monharulo, orharulo, ... Tamen, ili ĉasis la urson pro la bongusta viando kaj la valora felo.

Inter multaj arktaj popoloj oni sekvis la saman ritaron. La mortigita urso estis portita al la vilaĝo kiel honorgasto. Ĝojante kaj timegante oni kantis kaj

muzikis al ĝi, taksis ĝian felon. Oni kredis, ke se la urso estas gastame traktata, ĝi reiros al la ĉielo kaj rakontos, ke ne danĝeras fariĝi urso surtera kaj lasi sin esti kaptita de homoj. Ili bonege gastigas la kaptiton. La ĉasistoj kantis, ke ne ili mem mortigis la urson, sed iu alia, najbaro, ruso, aŭ ke la urso mem stumblis kontraŭ branĉoj, kiuj boris ĝian bruston kaj tranĉis ĝian ventron. En Kalevala la ĉasisto diras: „... lanco ne bezonis flugi, arko ne bezonis pafi: mem la urso renversiĝis”.

La ostojn de la manĝita urso oni rearanĝis en ties skeleta ordo sur la teron ĉe bela loko, kie kreskas maljuna impona pinego. La kranio estis levita supren sur branĉon „por ĝojigi ĉiujn homojn, por kultigi gevagulojn” (Kalevala). La dentojn kaj ungojn prenis la ĉasistoj. Ili estis konsiderataj kiel utilaj kaj fortegaj magiaĵoj, protektaj kaj kuracaj.

En Finnlando la kutimo meti la ursokranion sur pinobranĉon en tradicie sankta loko vivetis ankoraŭ en la 1930-aj jaroj en foraj arbaraj regionoj. Ankoraŭ nun oni scias pri „sanktaj” rokoj, kiuj

aspektas kiel ursakapo aŭ surhavas homan profilon. Vizitante tian lokon kun religiisto, iu ĉefepiskopo esprimis la opinion, ke paganismo kaj kristanismo ne nepre kolizias, sed estas du facetoj de sankteco. Ĝuste sanktecon multaj finnoj sentas en la naturo, ne ĉiam en katedraloj.

Finna religiisto, Juha Pentikäinen, amikiĝis kun ĥanta¹ ŝamanfamilio. Ankaŭ la filoj de tiu familio sentis la sanktecon de prakultejo en Finnlando kaj rekonis la similecon de niaj praritoj. La finna vorto por „sankta” origine signifis „izolita, speciala, tabua”, ekzemple bosko, kie oni oferadis al dioj, aŭ tombejo inter picearo. La urso kiel motivo en blazonoj kaj diraĵoj daŭre vivas en nia popolo.

Saliko



MAGDOLNA ELEKES

1. Ĥantoj: gento en norda Rusio, parenca al finnoj.

Vojaĝromano klasika

Ĉi tiu verko unue eldoniĝis, felietone, en la franca lingvo, en 1872. Ĝi estas unu el la plej legataj romanoj de Jules Verne [ĵil vern], multfoje dramigita, plurfoje filmita, nekalkuleble da fojoj represita, tradukita en amason da lingvoj; sed, ial, la lingvo Esperanto devis atendi 120 jarojn (eble ĉar, verŝajne, preskaŭ ĉiu esperantisto, jam en sia infaneco aŭ juna adolteco, familiariĝis kun ĝi, kaj ne sentis bezonon, esperantolingve relegi ĝin).

Rerigardante la verkojn de Verne, ni povas iom miri pri lia populareco, kiel verkisto. Kiel prozisto, li verkis iom seke, kvazaŭ raportisto, kiu celas informi la mondon pri nekredebla, tamen reala, homa entrepreno, kaj trovaĵoj neniel anticipeblaj. Nuntempe, oni tre ofte atentigas al ni lian antaŭimagon pri agoj aŭ inventoj, kiuj ja efektiviĝis, sed nur longe post lia morto. Tio estas iom troigita. Jam de multaj jarcentoj aperadis fikciaj rakontoj pri flugoj al la luno, primitiva submara ŝipo jam estis priskribita en la jaro 1580, kaj pluraj provoj konstrui tiaĵon estis faritaj. Simile, veturbalonoj ekzistis, kaj ceteraj. Sed lia kapablo prezenti siajn fikciajn rakontojn tre realisme fascinis la publikon.

Verne mem malmulte veturis, kaj nur perlege konis la plej multajn lokojn, pri kiuj li skribis. En ĉi tiu esperantolingva eldono, la eldonisto Aleksander Korĵenkov post la rakonto donas serion da notoj, en kiuj li korektas faktodeklarojn de Verne, kaj plurfoje lian aritmetikon! Krome, la esperantolingva eldono korektas diversajn ortografierarojn kaj detaletojn de la originalo. Miaopinie, tio devus okazi nur en la notoj; ankaŭ evidentaj eraroj de kalkulado, identigo kaj ceteraj devus resti en la teksto, se ili ekzistis en la originalo.

Oni petis min komenti specife pri la traduko mem. Oni povas disputi pri multaj specifaj eroj. La vorto „de” estas regule misuzata post pasiva participo, en la traduko. La tradukinto ignoras la sig-

nifon, donitan al ĝi en la Fundamento, kaj ofte ripetita, emfaze, de la Akademio (ke ĝi tiupozicie indikas nur la aginton, kion oni nuntempe ofte indikas per „fare de”, aŭ tute simple per prepozicio „far”). Anstataŭe, en la traduko, post pasiva participo, „de” ofte uziĝas kun alia senco. Ekzemple: „provinco apartigita de la reĝolando Nizamo” (p.51); „elegante vestitaj de la nacia vesto” (p.120).

Subjektive ĝenis min la pezega vorto „Kavaliro”, kiu tradukas la anglan vorton „Sir”, kaj historie ne estas ligita specife al kavaliereco. Krome, laŭ la angla palaca tradicio, „Sir” kun kavaliereca signifo estas uzata nur kun la persona nomo, ne kun la persona kaj familia nomoj. En Esperanto mankas ordinara titolo signifanta „honorinda”. „Moŝta” eblas, sed ni ne kutimas al tio. Al tiu, kiu volas studi la aferon pli profunde, mi rekomendas la koncernen artikolegon en la multvoluma *Oxford English Dictionary*.

La uzo de la vorto „Kongreso” koncerne la usonan parlamenton estas usonismo ne uzinda en Esperanto.

Gramatika eraro: „Kiu timis ke la neĝamaso bremsu la ruliĝadon de la radoj kaj certe kompromitu la vojaĝon” (p.151). Ĉu la u-formo post la verbo „timi” eble estas francismo? Ĝi certe ne pravigeblas per la esperanta gramatiko.

„Teo kun unu panrostaĵo” (p.189): „toasto” estas jam esperantolingva termino, kaj multe pli taŭga ol la stranga koncepto, ke oni rostas panon!

Pli ĝenerale, la traduko legiĝas/aŭdiĝas, kiel precize tia: traduko. Mi scias, ke kelkaj tradukistoj emas supozi, ke ilia devo estas, resti „fidelaj” al la vortuzo, gramatiko, vortordo, kaj tono de la nacilingva teksto. Miaopinie, tio forviŝas la eblon ĝui la verkon. Mi ne konas la francan tekston de la verko de Jules Verne, sed ĝui ĉi tiun esperantolingvan tekston mi ne povis.

Ĉu tio signifas, ke mi malrekomendas la libron? Ne; nek ke mi rekomendas



ĝin. Ke la traduko desapontas min, nu, jen tute subjektiva reago mia.

Donald BROADRIBB

Jules Verne : *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*. Tr. Jean-Luc Tortel. Eld. Sezonoj, Kaliningrado, 2008. 208 paĝoj kudritaj. ISBN ne indikita.

Prezo ĉe FEL: 20,99 eŭroj + afranko.



Edikto el oriento?

Jen libro – ho, jam tro respektema estas la vorto, „broŝureto” estas pli taŭga –, kiu ne plenumas sian promeson. La titolo „Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo?” starigas demandon. La subtitolo „Jes, sed nur per demokratia simbiozo de la kulturoj” donas la respondon, kvazaŭ aserto. Kaj jen la fino de la afero. Vi, leganto, akceptu tiun edikton de la aŭtoro.


En la broŝuro mem Jiří Laube sondas la fundamenton de la eŭropa kulturo, kiu, laŭ li, situas precipe en la lingvoj. Li distingas du specojn de lingvoj. Je unu flanko troviĝas la (nov-)hebrea/araĥa. Ili, laŭ lia takso, estas precipe intuitivaj, interalie pro manko de facila unusignifeco. Pro tio ke ŝvebas, ekzemple, vokaloj, interpreto de la lingvaĵo bezonas grandan imagopovon. Aliflanke,

estas la eŭropaj, latinparencaj lingvoj, kiuj pro tro granda influo de la klasika latina gramatiko estas tro raciemaj. Por ponti la abismon inter la du, aŭ pli bone por anstataŭigi la racian latinan lingvon per intuitiva lingvo, la aŭtoro proponas Esperanton.

En la dua parto li klarigas, kial Esperanto estas la solvo por eŭropa integriĝo. Bedaŭrinde li tie ne alportas novajn elementojn, sed nur papagas la jam tradiciajn kaj konatajn argumentojn (facile lernebla, neŭtrala, egalrajtita ktp).

Kvankam lia komenca analizo de la bazo de la eŭropa kulturo estas promesplena, la aŭtoro ne sukcesis profundigi sian diskurson, nek alportis iun ajn fundamentan, renovigan aŭ freŝigan koncepton.

Guido VAN DAMME



Jiří Laube: *Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo? Jes, sed nur per demokratia simbiozo de la kulturoj*. Eld. KAVA-PECH, Dobřichovice, 2007. 31 paĝoj broŝuritaj. ISBN 978 808585 396 4.

Prezo ĉe FEL: 2,10 eŭroj + afranko.



Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net
retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko

La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis

ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj,

kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

anoncetoj

Vizitu Iperity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 2200 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemple-ro. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0259-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO

12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>



**enciklopedieto
kun informoj kiel
telefoni el kaj al
eksterlando**

POŜKALENDARO

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

ENCIKLOPEDIETO

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli

La Jaro 2010

via poŝamiko dum la tuta jaro 2010



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezojn en p.4)

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)